

Sub tiu ĉi nomo okazis la 7-8an de oktobro 1978 en slovaka urbo *Žilina* (Jilino) seminario, kiun partoprenis 56 fakuloj el Ĉeĥoslovakio kaj Hungario. La labora parto de la aranĝo konsistis pure el fakaj referaĵoj, ĉiuj okazis en Esperanto.

Plejparto de referaĵoj, entute 16, enestas en kolekto, kiun ricevis ĉiu partoprenanto antaŭ la malfermo de la seminario. El la enhavo:

Signifo de la internacia kunlaboro kaj personaj kontaktoj de sciencistoj kaj teĥnikistoj (*A. Bednařík*); Scienc-teĥnika progreso kaj la estonto de la internacia lingvo (*N. Uzunov*); Apliko de Esperanto en la laboro de informcentroj (*Z. Hršel*); Pseŭdoelementoj en Esperanto (*J. Werner*); Tipologio kaj prilaboro de dulingvaj vortaroj (*M. Šaturová*); Pri la koncepto de la ĉeĥa-esperanta teĥnika vortaro (*A. Bednařík*); Novaj trovaĵoj de mineraloj en norda Bohemio (*R. Rychlý, M. Fengl*); Prienergiaj pripensetoj (*M. Tůma*); Energetiko, atomelektrejoj kaj veldado (*P. Todorov*); Varmteĥnikaj proprecoj de konstrumaterialoj (*J. Werner*); Pulvoraj materialoj kaj ties proprecoj (*H. Landsperský*); Míaj spertoj ĉe tradukado de medicinaj tekstoj Esperanten (*L. Izák*); Purigaj instalaĵoj por la malpurigita akvo en la urboj kaj vilaĝoj de la nordaj distriktoj de GDR (*W. Müller*); Aŭtomatizado de ranĝostacioj (*L. Kovář*); Pri certaj kalkulumetodoj por implicita funkcio (*J. Švejda*); Priservaj subrutinoj de la periferio en la operaciad-sistemo *V. Němec*.

Krome prelegis: *O. Haszpra, Á. Máthé, I. Bujdosó* kaj *Z. Hostomský*.

La seminarion organizis scienc-teĥnikaj sekcioj de la slovaka kaj ĉeĥa Esperanto-Asocioj kaj Sindikata Domo en *Žilina*. Ĝia celo estis kontaktigi la fakulojn-esperantistojn kaj praktiki la internacian lingvon aktive kaj pasive en maniero ĝis nun rara. La celoj estis atingitaj, ĝenerala pritakso de la aranĝo estas pozitiva. Estis decidite, la seminarion ripeti ĉiun duan jaron. Estas dezirinde, ke similaj aranĝoj okazadu plurlande kiel internaciaj aranĝoj, el kiuj profitu fake kaj faklingve la frekventintoj kaj ankaŭ la internacia lingvo mem, provizore fake subevoluinta kompare kun la granda parto de lingvoj naciaj. *Žilina* do estu instigo.

we

## INTELESKO

Internacia Elektronika Esperanto-Kompostado

Gersi Alfredo Bays  
Caixa Postal 49  
89800 CHAPECÓ – SC  
Brazilo

### Nova trunka pluvakceptilo – “Antaŭtuko”

*L. V. Medvedev* \* (Sovetio)

Por kolekti trunkajn pluvakvojn en USSR pleje disvastiĝis metodo de *V. N. MINA* (1965). Li rekomendis uzi elipsajn zonojn el nedikaj gumaj tuboj. Interna flanko de la tubo, tranĉita laŭ longo, estas premata al trunko. La mal-supran randon oni najlas al antaŭe fajlita elipsoforma loko de la trunko. Inter la supra rando kaj la trunko oni ŝovas branĉetojn por formi kanaleton laŭ kiu la pluvakvo fluu en la akceptilon. Por hermetikeco, la kanaleta fundo estas ŝmirata per akvorezista ŝmirajo.

La metodo havas kelkajn esencajn malavantaĝojn:

1. Por fiksi la zonon, eĉ mezdika arbo estas vundata per 30-40 najloj;
2. La najloj, tiom pli metalaj, povas influi bioĥemiajn procezojn en la arbo kaj pere de tio – ĥemiajn kvalitojn de la kolektataj akvoj;
3. Vintre la gumo krevas kaj sekvajare la novaj zonoj devas esti farataj sur alia arbo;
4. Por fari unu zonon estas necesa tro granda tempo – ĉ. 1 horo.

La proponata metodo, provita dum 3 jaroj, ne havas la malavantaĝojn. Por fari “antaŭtukon” – novan trunkan pluvakceptilon estas necesaj: 1. plasta membrano 0,1-0,2 mm; 2. kaprona fadeno 0,3-1,0 mm; 3. parafino.

El la membrano oni fasonas simetriajn, preskaŭ egallaterajn triangulojn. Ilia bazo devas esti je kelkaj centimetroj pli longa ol circonfereco de la trunko kaj des pli longa ju pli longdaŭraj estos la esploroj. Por oportuna fikso de la tuko ĝia bazo estu rektangula.

Loko por fiksi la tukon (ordinare en alto 1,3 m) estas atente, por ne difekti floemon, fajlata je larĝo de la fajlilo. Post tio la tukan bazon oni fiksas sur la trunko per kaprona fadeno 0,3 mm. Flankojn de la bazo necesas fleksi antaŭ la fikso. Post flekso de la mala akra angulo formiĝas forte klinita kanaleta. Ĉar trunko havas malglataĵojn malofte pluvakvo akumuliĝas precize ĉe la angulo mala al la bazo. Pro tio per prova aspergado oni trovas la plej malaltan lokon de la kanaleta, faras en ĝi aperturon kaj fiksas sub ĝi funelon per dika kaprona fadeno.

Nur sur tre glataj arboj “antaŭtukoj” tiel faritaj dense kontaktas kun la trunko. Plej ofte estas necese plenigi ĉiujn fendojn kaj kavetojn per fandita parafino. Parafino estas oportune per peniko.

Du spertaj laboruloj muntas la “antaŭtukon” dum 5-10 min sur piceoj, 10-20 min sur tremoloj kaj betuloj. Por zonoj de *Mina* estas necese kelkoble pli.

La kanaleta el 0,2 mm-dika membrano ne malfaldiĝas eĉ sen specialaj

\* aspiranto de Moskva Ŝtata Universitato

teniloj. Tamen en mez- kaj maldensa arbaro kaj ĉe forta vento en tiajn kanalojn, kiel montris sperto, trans aperturoj en kronaro trafas oblikva pluvo. Por ke tio ne okazu kaj ĉe uzo de malpli dika membrano, estas necese altiri per fadeno randojn de la kanaletoj al la trunko. Tiu ĉi fadeno estas fiksata al la ĉefa fadeno, kiu fiksas la tukan bazon.

En zono de modera klimato de Eŭropo diurnaj precipitaĵoj ekstreme malofte superas 60 mm-ojn. Por plene kolekti ilin sub foliarboj estas necesaj 5-10 l plastaj ujoj, sub pinglarboj – 1-2 l (*L. V. Medvedev, 1976*). Depende de la formo kaj kapacito ili povas stari surgrunde aŭ pendi surtrunke sub kolekta funelo. Anstataŭ standardaj funeloj bone servas amatoraj kornetoj el la sama plasta membrano.

Ekspérimenta arbo dum neexplora tempo bezonas "ripozon". Por tio estas necese malstreĉi la ĉefan tenilon. Parafino mem bone tenas la tukan. Tion fari estas tute simple, se fiksi la fadenon ne per nodo, sed per turna bastoneto. Unu duonturno de 2-3 mm-dika bastoneto proksimume egalas al jara alkresko de la trunko. La bastoneto estas fiksata aŭ per aparta fadeno aŭ kontraŭ nature kreskanta branĉo.

Por laboro sekvajare estas necesa nur malgranda ripara parafinado. Tiele, la proponata modelo, konservante arbojn en bona stato garantias longtempajn esplorojn, sen kiuj fidindaj konkludoj pri vivo de la naturo, pri stato de medio ne eblas.

## Referencoj

- MEDVEDEV, L.V. (1976): Kemia ŝanĝiĝo de atmosferaj akvoj traintaj arbarokronaron. SCIENCAJ KOMUNIKAĴOJ. Eld. de HEA, Budapeŝto.
- MINA, V.N. (1965): *Počvovedenie*, 6.


### Novij stvolovoj doĵdepriemnik – "fartuk"

*Dla mnoholetnego izučenia doĵdevilj, stekajuŝilj po stvolam derevjev, avtorom predlofen novij doĵdepriemnik – "fartuk" iz plastmassovoj plenki, zakreplennij na dereve kapronovoj nitkoj i parafinom. Poslednij sluĵit takĵe dla germetiĉnosti. Konstrukcia ispitana v teĉenie 3-lj let.*


A Trunka tuka pluvakceptilo.

Trunka cirkonferenco + 5 - 10cm

5-10cm



- A - fasono de la "antaŭtuko"  
 B - "antaŭtuko" surtrunke  
 a - trunko, b - tukfiksilo, c - tuko.  
 ĉ - kanaletoj, d - aperturo, e - funelo.  
 f - kokekta tubo, g - tubfiksilo.



## Jubileas du ISAE-estraranoj

C. Stöp-Bowitz: 65

V. Zázvorka: 75

*RNDr. Vlastislav Zázvorka, CSc.*, naskiĝis la 3-an de oktobro 1903 en la krimea Simferopolo. Liaj gepatroj estis ĉeĥoj, devenintaj de la regiono ĉirkaŭ la mitologia monto Ripo (Říp), kien la familio baldaŭ revenis kaj kie *Vlastislav* pasigis sian infanaĝon. Dum la jaroj 1915-1923 li studis en Roŭdnico ĉe Elbo (*Roudnice nad Labem*). Kiel gimnazia sepaklasano, aŭtune 1921, li ricevis de sia patro du librojn: la lernolibron, kiun *L. L. Zamenhof* estis verkinta por la rusoj, nome "*Meĵdunarodnij jazik*" (1-a eld., 1887) kaj Vortaron Ĉefan-Esperantan, verkitan de *E. Kühnl* kaj *K. Procházka*. Tio estis la unua renkontiĝo de *V. Zázvorka* kun Esperanto.

Post la maturec-ekzameno, li venis Pragon por studi geologion kaj geografion ĉe la naturscienca fakultato de Karola Universitato. Interesis lin unuavice paleontologio kaj speciale la kretacea formacio, kiun li konis el la ĉirkaŭaĵo roŭdnica. Tiam li estis en kontakto kun prof. *A. Pitlík*, la lektoro de Esperanto ĉe Teĥnika Altlernejo en Prago kaj pli poste kun la fama germana paleontologo-esperantisto, prof. *A. Liebus*.

Jam kiel studento universitata li ofte vizitadis la geologian-paleontologian sekcion de la Nacia Muzeo en Prago kaj laboris en ĝi kiel volontulo. Li finis la fakultaton en 1927 kaj doktoriĝis en 1928. Ekde 1929 li fariĝis profesia laboranto de la muzeo.

En 1938, d-ro Z. ellaboris sian negativan starpunkton al usona projekto, krei novan internacian lingvon. Li emfazis, ke ekzistas jam Esperanto, perfekte taŭga lingvo internacia. Dum la 2-a mondmilito regule vizitadis d-ron Z. s-ano *J. Hebký*, kiu dum siaj deĵorvojaĝoj renkontadis esperantistojn en Danlando. Anflanke, la ĉefdelegito de UEA, s-ro *J. Šustr*, ofte akceptadis d-ron Z. en sia praga butikoj.

Tuj post la milito, la poresperanta aktivado de d-ro Z. orientis sin al la ĉeĥoslovaka Esperanto-Asocio kaj al la praga Esperantista Klubo. Kun ISAE, d-ro Z. renkontiĝis unuavice en 1947, kiam la landdelegita funkcio estis plenumata de *RNC. J. Hanuš*.

En 1956 d-ro Z. akiris la gradon de *CSc.* (kandidato de la geologiaj sciencoj). Unu jaron antaŭe li ekfunkciis kiel la ĉefo de la geologia-paleontologia sekcio, en 1970 kiel la direktoro de la naturscienca departemento kaj fine, en 1971, li atingis sian kulminan funkcion: li fariĝis la ĝenerala direktoro de Nacia Muzeo en Prago. En 1972 kaj 1973, la kulturministerio atribuis al li du gravajn honorigojn pro liaj eksterordinaraj meritoj.

Ekde 1963 d-ro Z. komencis regule vizitadi la kunvenojn de Esperantista Klubo kaj ekde 1965 labori en la fus fondita Geologia Sekcio de ISAE, kies prezidanto li fariĝis en 1974. La sekcia periodaĵo GEOLOGIO INTERNACIA, aperigata ĉiun kvaran jaron okaze de Internaciaj Geologiaj Kongresoj, alportis du originalajn traktaĵojn el la plumo de d-ro Z.: "Subzono *Actinocamax plenus* en la supra kretaceo de Eŭropo" (1968) kaj "Paleoekologiaj kaj litologiaj rilatoj en la supra kretaceo de Bohemio" (1976). Krome li regule publikigas Esperanto-resumojn de siaj ĉeĥ-lingvaj artikoloj en *Časopis Národního Muzea* (Gazeto de Nacia Muzeo).

Bedaŭre ne eblas, ke mi ĉi-loke referencu pri la vasta scienca verkaro de d-ro Z. Ĝi ampleksas tricent titolojn pri geologio, paleontologio, biostratigrafio. Krom la formacio kretacea, kiu estas la ĉefa laborkampo de d-ro Z., temas ankaŭ pri terciaro, kvaternaro k.a. Jen impona trezoro de profundaj sciencaj informoj, malkovroj, konkludoj, trezoro ĉiujare pli riĉa, ĉar d-ro Z. ne ĉesas diligenti super pluaĵ verkoj.

Min mem precipe profunde impresis lia efika kaj geografe kompetenta kunlaboro, kiam necesis rapide redakti por la praga eldonejo *Kartografie* la libron POŠATLASO DE